Universala Esperanto-Asocio

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# Landa parad'

## Kalejdoskopo de la regiona, landa kaj loka agado de nia mondvasta komunumo

Projekto lanĉita en 2018 sub la nomo GAMO.

LATIN-

# AMERIKO





Redaktoro: Stefan MacGill, Budapeŝto, majo 2022

2021: aprilo. 2019: Versio 3: novembro 2019

2018: Versio 2: junio 2018, Versio 1: januaro 2018

© Universala Esperanto-Asocio
© Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

# Landoj en Ameriko

## Regiona Resumo:

Latinameriko enhavas 55 landojn, en kiuj ni prezentas informojn pri 15. El tiuj 10 havas aliĝintajn landajn asociojn de UEA (7 en suda ameriko kaj tri en centra ameriko). La listo por nun kovras nur landojn kun delegitoj. <Landa parad> estas dinamika dokumento, do ĝi ricevos ĝisdatigojn. TEJO havas kvin sekciojn; ILEI havas nur tri sekciojn (Brazilo, Kubo, Meksiko).

**Centra Ameriko** formale ampleksas 7 landojn, el kiuj ni prezentas tri, sed ni aldonas Meksikon kaj la landojn de la Karibeo: Belizo, Dominika Respubliko, Haitio, Kubo, do ni prezentas informojn entute pri 6 landoj. Gvatemalo, Haitio, Kostariko, Kubo, Meksiko kaj Nikaragvo. El tiuj du havas aliĝintajn Landajn Asociojn (CR, CU), du pliaj havas asociojn nealiĝintajn (GT kaj NC). Ni tamen aldonas Meksikon, ĉar ĝia rolo esencas al la Centra Ameriko, eĉ se ili formale apartenas al Norda Ameriko.

**Suda Ameriko** ampleksas 13 landojn, en vicordo laŭ surfaca areo: Brazilo, Argentino, Peruo, Kolombio, Bolivio, Venezuelo, Ĉilio, Paragvajo, Ekvadoro, Gujano, Urugvajo, Surinamo kaj Franca Gujano. El tiuj ni prezentas informojn pri 8 – 7 el ili kun aliĝintaj Landaj Asocioj.

**Norda Ameriko:** Prezentita aparte en la <Landa Parad'>en la regiono 'Pacifiko'.

# Novigoj en aprilo 2022

- Aktualigo de la membro-informoj ĝis la fino de 2021 (inkluzive de Fondaĵo Canuto)
- Aktualigo de la Komitato de UEA, valida ĝis julio 2022.
- Aktualigo de la datumoj pri la ekonomia bonfarto (MEP/PAP) – Po-persona Aĉetpovo.
- Retestado de ĉiu retadreso kaj retejo.
- Aldono de Faka Kavalkado por faciligi kontaktadon kun Fakaj Asocioj.
- Pligrandigo de kelkaj mapoj.

# Novigoj en januaro 2021

- Plia detalo pri la Vikipedia paĝo en Esperanto, kune kun ligilo.
- Aldonitaj informoj pri la loĝantaro: Jara kresko, meza aĝo kaj la grado de urbiĝo.
- Ebleco por la aldono de informoj pri Lokaj kluboj kaj Eo-centroj.
- Transiro de baza MEP al MEP-PAP: la po-persona aĉetpovo – pli justa mezuro.
- Naciaj flagoj ĉe la landoj.
- Malkovro de la pionira membrovarba rolo de Monda Fest': DO, HT, CO, PE, VE.
- Ekspansio de la sekcio pri Aliaj Asocioj por kovri ĉiujn aliĝintajn fakajn asociojn.
- Landagadaj nomumitoj de TEJO:
    - Norda/Centra Ameriko: Javier Ramos Nistal (co2mm.esperanto@gmail.com), Kubo
    - Sud-Ameriko: Alexandre (Alekĉjo) Raymond (alekcxjo@gmail.com), Brazilo

Notu, ke la landaj informoj en Vikipedio estas plejparte aktualigitaj centre, ne loke.

# Rekomendoj:

- La Amerika Komisiono starigu amerikan aŭ latinamerikan bazan retpaĝon, hispane kaj en Esperanto, kiu servu la multajn landajn asociojn, kiuj ne havas propran paĝon. Tiu retejo donu ampleksan liston de kursoj hispanlingvaj kaj aliaj. Rekomendita ekde 2020.

- La movado notu la rimarkindan laboron de i.a. Monda Fest' anonci junulojn en latinamerikaj landoj (Domingo, Haitio, Kolombio, Peruo, Venezuelo), kaj donu ĉian subtenon, ke tio daŭru plujare, kaj progresu ĝis la punkto fondi sekcion aŭ asocion.
- Kontrolu kaj ĝisdatigu la datumojn por popoloj kaj MEP en Vikipedio; uzeblas la ciferoj el ĉi tiu dokumento.
- Sekvu la rimarkindan retan laboron en Brazilo kaj Kolombio por la konigo de Esperanto al pli vasta publiko.
- Aktive laboru por ke la reprezentiĝo de Latin-Ameriko estu pli forta en la Komitato de UEA, precipe post la renomumigoj de julio 2022.

Trovu la plej freŝajn rezultojn por Landa Parad' ĉe: <aktivulo.net> .

## Enketado por 2022:

La preskaŭ kompleta manko de respondoj al la vasta dissendado de la dokumento al la Amerika Komisiono kaj al unuopaj landoj estas tre hontiga kaj seniluziiga.

*Respondis (2 landoj)*
Ĉilio, Kostariko,


*Ne respondis (11 landoj)*
Bolivio, Brazilo, Gvatemalo, Honduro, Kolombio (surprize), Kubo (surprize), Meksiko (ankaŭ surprize), Nikaragvo, Peruo, Urugvajo, Venezuelo.

*Neniu por kontakti: (3 landoj)*
Belizo, Domingo, Haitio.

Post la UK (do eble en septembro aŭ oktobro) la aganto de <Landa Parad'> devos reviziti ĉiujn erojn por aktualigi la datumon pri la konsisto de la onta Komitato de UEA por 2022-2025, kaj krome aktualigi la konsistojn de la komisionoj por la kontinentoj, kiujn la nova estraro devos rekonsistigi.

**Subtenu la agadon en Ameriko**

Ekzistas daŭre la Amerika Fondaĵo ĉe UEA, per kiu ili subtenas la gravan agadon tra la kontinento. La kontinento havas la lukson de nur du lingvoj vaste parolataj kaj komprenataj tra multaj landoj. Do, kursoj en la hispana havas ege grandan publikon kaj klare liveras bonegajn pozitivajn rezultojn. Rimarkinde, tri el la ok estraranoj en la nuna UEA vivas en la kontinento, kaj du el ili naskiĝis tie.




La mapo montras la agadon de UEA kaj la fakaj asocioj aliĝintaj al UEA. Mapo por Centra Ameriko sekvos sube.

La regiono Latin-Ameriko kaj la Karibo havas en 2022 popolon de 694 milionojn, sume keresko de 5,8 milionoj depost la lasta mezurado (eble 2019).. La meza aĝo estas 31-jara kaj la popolo ampleksas 8.4% de la monda popolo.

Neniu lando en Latinameriko respondis al la invito de UEA komence de 2022 arigi informojn pere de la pli efika helpilo UTILA.

===== ooooo =====

# Argentino 

**Landkodo:** AR**. Mono:** ARS (peso)**. Telefonkodo:** 54**. Ĉefurbo:** Bonaero (Buenos Aires). Kat. 3

**Areo:** 2.78 m. km$^2$ (8a en la mondo). **Loĝantaro**: 45 milionoj (32a); 3 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 17 homoj / km$^2$.. **Jara kresko:** 0.93% **Meza aĝo:** 32-jara **Urbiĝo:** 93%
**Pokapa MEP (PAP):** $25, 822 do en la 84a loko en la mondo. (2022)
**Vikipedio:** E-paĝo elstare bonas, ampleksas kaj aktualas. https://eo.wikipedia.org/wiki/Argentino

**Landa Asocio:** AEL, 1941, 1995 (aliĝo al UEA 1946). **Prez.:** Prof. Gabriel Wagner (ĝis 2021).
**Membroj de UEA fine de 2021:** 75 AM + 39 IM, sume 114 (estis 125).
**LA-adreso:** p/a Moritán 985, AR-8300 Neuquén Capital, Argentino
**LA retadreso:** rubensan15<ĉe>gmail.com
**LA-hejmpaĝo:** https://esperantoargentino.weebly.com/.
**Organo**: Argentina E-vento (4 n-roj); red. p/a AEL.



**Membraro en UEA (IM).**
2021: 39. 2010: 24.
FC 2021: 11. 2010: 7.
**Ĉefdelegito:** Ruben L. Sanchez, Nequen.
**Kotizperanto:** Laŭ JL 2018 mankas.
**Komitatano de UEA:** S-ro Rubén Luis Sánchez (Kom. A)
**Sidejo:** Nequen, neklare ĉu ekzistas oficejo. Libroservo ĉe AEL
**Kurso:** Retkurso organizitia de AEL .La ligo ne plu funkcias, majo 2022.

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 13 personoj (1 ĈD, 10 D, 0 VD, 9 FD) en 8 urboj.
**Aliaj asocioj:**
TEJO (sekcio – samadrese kiel AEL),
ILEI: kontaktpersono: G.E. Wagner, <info<ĉe>esperantoklubo.org>
**Internaciaj aranĝoj:** La 99a UK en 2014 (vidu la foton de la futbala teamo dum la UK 2014), la 2a TAKE en Bonaero en 1980.

2022: Al la Amerika komisiono majo 15. Al la landoj majo 23
2021: sendis feb 14. RS. Respondis feb 21.
2017: Iris al AEL, MG (resaltis), MS, dec 2017.

# Belizo 

**Landkodo:** BZ**. Mono:** BZD (dolaro)**. Telefonkodo:** 501**. Ĉefurbo:** Belizurbo. (Belmopano). Kat. 2

**Areo:** 23 mil km$^2$ (147a en la mondo). **Loĝantaro**: 398 mil; 125 mil en la ĉefurbo.
**Denseco**: 17 homoj / km$^2$ **Jara kresko:** 1.86% **Meza aĝo:** 25-jara **Urbiĝo:** 46%
**Pokapa MEP (PAP):** $6,133 do en la 158a loko en la mondo.
**Vikipedio:** https://eo.wikipedia.org/wiki/Belizo

**Landa Asocio:** Ne estas, nek organo.

**LA-adreso kaj LA retadreso:** --
**LA-hejmpaĝo:** Latin-amerika retejo?

**Membraro en UEA.** 2021: 0. 2019: 1. 2009: 1.  FC 2021: 0. 2009: 0.
**Kotizperanto kaj Komitatano de UEA:** --

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 1 persono (1 D) en 1 urboj: San Ignacio.
**Aliaj asocioj:** Neniu konataj.
**Internaciaj aranĝoj:** Neniu konataj.

2022: Neniu por kontakti.
2021: Transsaltita feb 16. Sen membroj; 2017: Iris al tiama D  dec. Neniam venis reago.

# Bolivio 

**Landkodo:** BO**. Mono:** BOB (boliviano)**. Telefonkodo:** 591**. Ĉefurbo:** La Paz. Kat. 2

**Areo:** 1,1 m. km² (27a en la mondo). **Loĝantaro**: 11,7 milionoj; el kiuj 1,46 milionoj en Santa Cruz de la Sierra.
**Denseco**: 11 homoj / km² . **Jara kresko:** 1.39%  **Meza aĝo:** 26-jara  **Urbiĝo:** 69 %
**Pokapa MEP (PAP):** $ 9,865 do en la 151a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas. Lasta redakto: 2020: https://eo.wikipedia.org/wiki/Bolivio

**Landa Asocio:** Ne estas.
**LA-adreso kaj LA retadreso:** --
**LA-hejmpaĝo kaj Organo: --**

**Membraro en UEA.** 2021: 3 2010: 1.  FC 2021: 1. 2010: 1.
**Kotizperanto kaj Komitatano de UEA:** --
**Sidejo:** --

**Delegitoj el JL 2018:** 1 persono (1 D, 1 FD)  en 1 urbo: La Paz.
**Aliaj asocioj:** ILEI kontaktpersono: Leandra Dia Rios <mileis_7<ĉe>hotmail.com>
**Internaciaj aranĝoj:** Nenio konata.

2022:  Ne venis reago.
2021:  ne venis reago.
2018: Sendis al delegito Arzekaj Leandra Diaz Rios, 2018




# Brazilo 

**Landkodo:** BR**. Mono:** BRL (real). **Tel.:** 55**. Ĉefurbo:** Brazilio (Brazilia). Kat. 3

**Areo:** 8,5 m. km² (5a en la mondo). **Loĝantaro**: 213 milionoj (6a); 21 milionoj en São Paulo.

**Denseco**: 25 / $km^2$. **Jara kresko:** 0.72%  **Meza aĝo:**.33-jara  **Urbiĝo:** 88%
**Pokapa MEP (PAP):** $17,08 (113a en la mondo). 2022
**Vikipedio:** Eo ekzistas, ampleksas, sed la informoj pri popoloj datas el 2016. Lasta redakto: dec 2021.
https://eo.wikipedia.org/wiki/Brazilo

**Landa Asocio:** BEL, 1907 (aliĝo al UEA 1933). **Prez.:** Evandro Ferreira de Avellar.
**Membroj fine de 2021:** AM  37 +IM 308, sume 345.
**LA-adreso:** SDS 36, Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília – DF.
**LA retadreso:** bel<ĉe>esperanto.org.br
**LA-hejmpaĝo:** www.esperanto.org.br.
**Organo:** Brazila Esperantisto (2 n-roj); red. p/a BEL.

**Membraro en UEA (IM):** 2021: 308. **2018: 353**. 2010: 349.  FC 2021: 32. 2010: 18. Baza problemo estas la daŭra falado de la kurzo de la realo.
**Ĉefdelegito:** Alex Sousa Santos
**Kotizperantoj:** BEL kaj la E-Asocio de São Paulo.
**Sidejo:** Oficejo de BEL en Braziljo, kun Libroservo. (Vidu la foton sube).
**Lokaj grupoj** (regione): Lokaj grupoj (province): Brazilo havas 27 federaciajn unuojn - 26 provincojn (ofte nomitaj ŝtatojn aŭ subŝtatojn, en la portugala "estados") kaj unu federacia distrikto, kie estas la ĉefurbo kaj la sidejo de BEL; 15 el ili kalkulas je registritaj lokaj asocioj - Alagoas, Amazonas, Bahia, Ceará, Distrito Federal, Goiás, Mato Grosso, Mato Grosso do Sul, Minas Gerais, Paraná, Pernambuco, Rio de Janeiro, Rio Grande do Norte, Rio Grande do Sul kaj São Paulo.. La provincoj Espírito Santo, Pará, Paraíba, Rondônia kaj Santa Catarina ne havas registritajn asociojn, sed kalkulas je aktivaj kluboj aŭ reprezentantajn aktivulojn.
**Delegitoj laŭ JL 2018:** 142 personoj (1 ĈD, 52 D, 14 VD, 4 JD, 131 FD)  en 70 urboj. La lando kun la plej alta nombro da delegitoj en la mondo.
**Komitatanoj de UEA ĝis 2022:** Fernando Maia Jr (Kom A), Emilio Carlos Vaz Cid (Kom B).

**Aliaj asocioj**:
TEJO (BEJO ĉe BEL), retejo: http://bejo.esperanto.org.br/
ILEI (sekcio) <esperantomaceio<ĉe>yahoo.fr> (A.A. Alves Filho).
IKEF: Fabricio Valle, esperanto@fabriciovalle.com.br.
UMEA: Havas membrojn. Kontaktu: uea<ĉe>uea.org
IFEF kaj LIBE: Sen landa vidigo.
ISAE: plena manko de laŭlandaj informoj.

**Ekstera informado:** <leandro.brazilo@gmail.com



**Internaciaj aranĝoj:** La 66a UK en 1981 en Brazilio, la 87a UK en en 2002 en Fortaleza. IIK estis planita sed ne povis okazi. La 58a IJK en 2002 en Pato Branco, La 70a IJK en 2014 en Fortaleza; La 1a TAKE en 1978 en Mariljo; la 8a TAKE en 2011 en São Paulo. La 3a AMO-seminario en 2014 en la IJK en Fortaleza, la 10a AMO-seminario en 2015 en Rio de Janeiro, la 19a seminario en 2016 en Manaus. BEL gajnis Trofeon Fyne en 1991.

2022: Ne venis reago.
2021: FM respondis.
2017: Iris al BEL, dec.

# Ĉilio 

**Landkodo:** CL, **Mono:** CLP (peso). **Telefonkodo:** 56**. Ĉefurbo:** Santiago. Kat.: 3

**Areo:** 756 mil $km^2$ (37a en la mondo). **Loĝantaro**: 19.1 milionoj (63a); 5.6 milionoj ĉefurbe.
**Denseco**: 26 / $km^2$. **Jara kresko:** 0.87% **Meza aĝo:** 35-jara **Urbiĝo:** 85%
**Pokapa MEP (PAP):** $ 28,526 (81a loko en la mondo).
**Vikipedio:** **P**rezento en Eo ekzistas, sed la informoj pri MEP datas el 2007. Ne nepre trovebla pro la supersigno. Aliru ĝin tra la paĝo en via nacia lingvo, ekzemple:
https://hu.wikipedia.org/wiki/Chile Lasta redakto: mar 2022.
https://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%88ilio (nefunkciigebla pro la mistrakto de supersignoj).
Datumoj por MEP el 2007 (15 jaroj eksdataj)

**Landa Asocio:** ĈEspA, 1978 (aliĝo al UEA 1979). **Prez.:** José Antonio Vergara O. (FD en Puerto Montt). **Membroj de UEA fine de 2021**: 25 AM + IM 17, sume 42. (kresko de 34)
**LA-adreso:** Casilla 231, CL-334-900-1 Curicó, Ĉilio (ĉe la Ĉefdelegito).
**Telefono:** +569 5324 4853 (ankaŭ la ĉefdelegito).
**LA retadreso:** informaciones<ĉe>esperanto.cl
**LA-hejmpaĝo:** www.esperanto.cl. Kaj https://www.facebook.com/cxespa/
Pri la historio de ĈESPA: https://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%88ilia_Esperanto-Asocio

**Membraro en UEA.** 2021 17. 2010: 9. FC 2021: 2. 2010: 5.

**Ĉefdelegito:** Hector Campos Grez. <strigo<ĉe>speranto.cl>

**Kotizperanto:** Ne estas. Indus strebi nomumi tion.
**Sidejo:** Adreso en Santiago. Ne estas oficejo.
**Komitatanoj:** ĈespA rajtas je observanto sed ne deklarita aŭ notita. (Ankoraŭ majo 2022).

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 4 personoj (1 ĈD, 2 D, D, 4 FD) en 3 urboj: Curico, Puerto Montt, Santiago.
**Lokaj grupoj:** Ne estas.

**Aliaj asocioj**:
TEJO (nealiĝinta LS: informationes@espeĈEJO),
ILEI : reprezentanto: H. Grez <strigo<ĉe>speranto.cl>. Ankaŭ por skolta agado.

2022: respondis H.C. Grez, je majo 18.
2021: feb 16 al Cespa, Grez, Vergarra. HG respondis feb 28.
2020: ĈespA liveris unu korekton, krom tio aprobita, dec. 2019; 2018: Iris al ĈEL, MS, amerika komisiono,

# Domingo (Dominika Respubliko) 

**Landkodo:** DO. **Mono:** DOP (peso)**. Telefono:** 809/829/849**. Ĉefurbo:** Santa Domingo. Kat 2

**Areo:** 48 mil $km^2$ (128a en la mondo). Lokita sur la insulo Hispaniola, kune kun Haitio.

**Loĝantaro**: 10,8 milionoj, 2.9 milionoj en la ĉefurbo.
**Denseco**: 225 homoj / $km^2$. **Jara kresko:** 1.01% **Meza aĝo:** 28-jara. **Urbiĝo:** 85%
**Pokapa MEP (PAP):** $ 23, 983, do en la 90a loko en la mondo.
**Vikipedio:** E-paĝo bonas, sed la loĝantaraj datumoj el 2010. MEP sen dato. Lasta redakto: sep 2021. https://eo.wikipedia.org/wiki/Domingo

**Landa Asocio:** Ne estas (fondinda kun junuloj?)
**LA-adreso kaj LA retadreso:** --
**LA-hejmpaĝo kaj Organo:** --

**Membraro en UEA.** 2021: 9. Falo de 20! 2010: 2. FC 2021: 0. 2010: 2. Plejparte junuloj.

**Kotizperanto:** --
**Komitatano de UEA:** --
**Sidejo:** --
**Lokaj grupoj:** Nekonataj.

**Delegitoj:** 2 personoj (2 D, 1 JD, 2 FD) en 2 urboj, Puerto Plata kaj Santiago de los Caballeros.
**Aliaj asocioj:** Neniu konata.
**Internaciaj aranĝoj:** Neniu konata.

2022: Neniu por kontakti.
2021: Al du junuloj. Sen reago
2017: Iris al Delegitoj: dec 2017. Sen reago.

# Gvatemalo 

**Landkodo:** GT**, Mono:** GTQ (quetzal). **Telefonkodo:** 502**. Ĉefurbo:** Gvatelmalurbo. Kat. 2.

**Areo:** 109 mil $km^2$ (195a en la mondo). **Loĝantaro**: 17.9 milionoj (66a); 925 mil ĉefurbe.
**Denseco**: 167 / $km^2$ (85a). **Jara kresko:** 1.9% **Meza aĝo:** 23-jara **Urbiĝo:** 52%
**Pokapa MEP (PAP):** $ 9,911 (150a en la mondo - 2022)
**Vikipedio: P**rezento en Eo ekzistas, sed la informoj pri MEP datas el 2005 – eksdatiĝo de 18 jaroj.. Lasta redakto: marto 2021. https://eo.wikipedia.org/wiki/Gvatemalo


**Landa Asocio:** GEA, nealiĝinta al UEA. Membroj: Nedeklaritaj.
**LA-adreso:** Aptdo. Postal 2155, GT-01901 Ciudad de Guatemala
**LA retadreso:** --
**LA-hejmpaĝo:** Ne estas. Sendu al Latinamerika paĝo?
**Membraro en UEA.** 2021: 5. 2010: 2. FC 2021: 1. 2010: 1.

**Kotizperanto:** Ne estas.
**Sidejo:** Adreso en Gvatemalurbo.
**Komitatanoj:** --

**Delegitoj:** 2 personoj (1 D, 2 FD) en 2 urboj: Chimaltenango, Guatemala.

**Aliaj asocioj**:Neniuj konataj.

2022: Sen respondo.
2021: Iris al du membroj. Sen reago
2020: Iris al la du delegitoj, LA ne havas retadreson. Sen reago.




La mapo kovras Centran Amerikon kaj la Karibon. Ni aldonas Meksikon, Venezuelon kaj Kolombion, ĉar ili povas tre utile konlabori pri progreso en la regiono.

# Haitio 

**Landkodo:** HT, **Mono:** HTG (gourde). **Telefonkodo:** 509**. Ĉefurbo:** Port-au-Prince. Kat. 1.

**Areo:** 27, 8 mil km² (143a en la mondo). **Loĝantaro**: 11.4 milionoj (82a); 1.2 ĉefurbe.
**Denseco**: 414 / km². **Jara kresko:** 1.2% **Meza aĝo:** 24-jara **Urbiĝo:** 57%
**Pokapa MEP (PAP):** $ 3,189 (197a loko - 2022).
**Vikipedio: P**rezento en Eo ekzistas, kaj estas ĝisdata. Lasta redakto: mar 2020.
https://eo.wikipedia.org/wiki/Haitio

**Landa Asocio:** Ne estas. (Fondebla per la junuloj?)
**LA-adreso kaj LA retadreso:** --
**LA-hejmpaĝo:** Ne estas. Sendu al iu latinamerika paĝo?

**Membraro en UEA.** 2021: 0. 2010: 0. FC 2021: 0. 2007: 0. Bela junula kresko, kiu tuj velkis. Falo de 6 al nulo en unu jaro.

**Kotizperanto, komitatano, delegitoj kaj sidejo:** Ne estas.

**Aliaj asocioj**:TEJO (HEJA – sed ne aktivas kaj ne havas adreson). Unu haitiano partoprenis en la UK en Kubo en 2010, poste malaperis.

2022: konsiderata morta.
2021: Iris al kvar junuloj. Sen reago. 2020: Neniu adreso al kiu sendi la tekston.

# Honduro 

**Landkodo:** HN. **Mono:** MNL (lempira)**. Telefonkodo:** 504**. Ĉefurbo:** Tegucigalpa. Kat.: 2

**Areo:** 113 mil km² (101a en la mondo). **Loĝantaro**: 9,9 milionoj (92a); 996 mil en la ĉefurbo.

**Denseco**: 89 homoj / km². **Jara kresko:** 1.63% **Meza aĝo:** 24-jara **Urbiĝo:** 57%.
**Pokapa MEP (PAP):** $ 6,740 do en la 163a loko en la mondo. (2022
**Vikipedio:** E-paĝo ekzistas, https://eo.wikipedia.org/wiki/Honduro MEP el 2018. Lasta redakto: jan 2022.

**Landa Asocio:** Ne estas.
**LA-adreso kaj LA retadreso: --**

**LA-hejmpaĝo:** Ne estas. Sendu al latinamerika paĝo.

**Membraro en UEA.** 2021: 2. 2010: 2. FC 2021: 1. 2010: 2.
**Kotizperanto kaj Komitatano de UEA: --**

**Delegitoj:** 1 personoj (1 D, 1 FD) en 1 urbo: San Pedro Sula.
**Aliaj asocioj kaj internaciaj aranĝoj:** Neniuj konataj.

2022: Sen reago.
2021: iris al du adresoj. Sen reago. Rego1 malvalida.


# Kolombio 

**Landkodo:** CO. **Mono:** COP (peso). **Telefonkodo:** 57**. Ĉefurbo:** Bogoto (Bogota). Kat.: 2.



**Areo:** 1,14 m. km² (25a en la mondo). **Loĝantaro**: 51 milionoj (29a); 8 milionoj ĉefurbe.
**Denseco**: 46 / km²). **Jara kresko:** 1.08% **Meza aĝo:** 31-jara **Urbiĝo:** 80%
**Pokapa MEP (PAP):** $ 18,225 (107a en la mondo). (2022)
**Vikipedio: P**rezento en Eo ekzistas, sed la informoj pri MEP datas el 2005 – do 18-jarojn eksdataj. Lasta redakto: majo 2022.

**Landa Asocio:** KEL, 1966 (aliĝo al UEA 1982). **Prez.:** Doniben Jimenez Jaramillo (sur la foto).
**Membroj de UEA fine de 2021:** AM 49+IM 81, sume 130 (41 antaŭ jaro!).
**LA-adreso:** Av. Caracas 38 #16-25, Bogotá kaj Luis Obando, C 24 E Oeste #6-24 San Fernando, 760043 Cali.
**LA retadreso:** <teamo<ĉe>esperanto.co>
**LA-hejmpaĝo:** www.esperanto.co. (bona, sed nur hispanlingva)
**Organo:** Andaj Ondoj. Ne plu ekzistas: Arkivo: www.geocities.com/andajondoj



**Membraro en UEA (IM):** 2020: 815. 2010: 14. FC 2021: 4. 2010: 6. Multaj junuloj!

**Kotizperanto:** Ne estas. Indus strebi nomumi tion.
**Komitato de UEA:** S-ino Alexandra Mendieta (sur la foto dekstre).



**Sidejo:** Adreso en Cali. Kredeble ne estas oficejo.

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 7 personoj (3 D, 1 VD, 6 FD) en 4 urboj: Bogota, Cali, Medellin, Neiva.

**Aliaj asocioj**: TEJO (KolombEJO). ILEI nepre trovu instruiston!
**Internaciaj aranĝoj:** La 4a TAKE-kongreso en 1999 en Bogoto.

2022: Sen reago ĝis nun.
2021: luis@esperanto.co, Luis Obando (sur la supra foto) tuj respondis.
2020: Iris al unu delegito, AMEk kaj MS, dec 2019. Sen reago.

# Kostariko 

**Landkodo:** CR**. Mono:** CRC (kolumbo). **Telefonkodo:** 506**. Ĉefurbo:** San José. Kat.: 3.

**Areo:** 51 mil $km^2$ (126a en la mondo). **Loĝantaro:** 5.1 m, (122a). el kiuj 342 mil en la ĉefurbo.
**Denseco:** 100 / $km^2$ . **Jara kresko:** 0.92% **Meza aĝo:** 33-jara **Urbiĝo:** 80%

**Pokapa MEP (PAP)**: $24,490 (89a en la mondo). 2022.
**Vikipedio:** prezento en Eo ekzistas. Informoj pri MEP datas el 2006– do ege eksdataj. Lasta redakto: mar. 2022. https://eo.wikipedia.org/wiki/Kostariko

**Landa Asocio:** KREA (fond. 1996, aliĝo al UEA: 1999), sidejo en San Jose. Membroj de UEA fine de 2021 : AM 25 + IM 4, sume 29.
**LA-adreso:** 50 m Este y 150 m Sur de Iglesia, Católica, Calle Chanto, casa # 16, Granadilla de Curridabat, San José, (ĉe Hugo Mora).
**LA retadreso:** Ne aperas.
**LA-hejmpaĝo:** Ne aperas.
**Retgrupoj:** Ekzistas en Fejsbuko prizorgata de Antonio Leoni de León.kaj *WhatsApp*.

**Membraro en UEA.** 2021: 4. 2010: 10. FC 2021: 0. 2010: 3.
**Kotizperanto:** S-ro Hugo Mora Polternieri, en Granadilla de Curridabat.
**Komitato:** Rajtus je observanto **– Neniu nomumita aŭ notita. Nepre nomumu iun ekde julio 2022!**

**Sidejo:** San José. Oficejo: nekonata.

**Delegitoj en 2018:** 3 personoj (2 D, 3 FD) en 2 urboj: San Isidro de el General, San José.
**Aliaj Asocioj:** ILEI (kontaktpersono: s-ro Hugo Mora <tikoguau<ĉe>gmail.com>.

2022: Respondis ALL majo 15
2021: Transsaltita. 2019: Iras al la delegitoj: **. Sen reago**

# Kubo 

**Landkodo:** CU**. Mono:** CUC (konvertebla peso). **Tel.:** 506**. Ĉefurbo:** Havano (Havanna). Kat.: 2.

**Areo:** 110 mil $km^2$ (104a en la mondo).
**Loĝantaro:** 11,3 m, (83a) el kiu 2,13 m. en la ĉefurbo.
**Denseco:** 106 / $km^2$**. Jara kresko:** 0
**Meza aĝo:** 42-jara. **Urbiĝo:** 78%

**Pokapa MEP**: Datumoj ne akireblaj.
**Vikipedio:** prezento en Eo ekzistas, ampleksas, Lasta redakto: jan 2022.

**Landa Asocio:** KEA (fond. 1979, aliĝo al UEA: 1983). **Prez.:** Maritza Gutiérez. **Membroj de UEA fine de 2021:** AM 419 + IM 29, sume 448.
**LA-adreso:** Apartado 5120, CU-10500 La Habana. (la sidejo tie sur la bildo.)
**LA retadreso:** kubesp<ĉe>enet.cu



**LA-hejmpaĝo:** http://www.esperanto.cult.cu/
**Organo:** esperanto.cu (4 n-roj), red. p/a KEA

**Membraro en UEA.** 2021: 29. 2010: 152.  FC 2021: 20. 2010: 145.
**Kotizperanto:** Ne estas.

**Sidejo:** Havano,. Nacia Sidejo, Esperanto-Centro (vidu la bildon),
Strato Vista Alegre 264  e/Luz Caballero y Juan B.Zayas, Diez de Octubre, La Habana
**Komitatano:** s-ino Maritza Gutierrez Gonzales (Kom A por Kubo).

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 16 personoj (3 D, 1 JD, 16 FD)  en 6 urboj.
**Lokaj grupoj:** Havano, Cienfuegos, Villa Clara, Granma, Santiago de Kubo, Guantánamo.

**Aliaj Asocioj:**
TEJO (JSKEA adreso ĉe KEA)**,**
ILEI (sekcio: Magaly Molina <maga1958<ĉe>nauta.cu>) .

**Internaciaj aranĝoj:** La 75a UK en 1990 en Havano, la 95a UK en 2010 en la sama kongresejo en Havano. La 6a TAKE en 2014 en Havano kaj la 9a TAKE en februaro 2018. La 46a IJK en 1990 en Playa Girón. La 24a Konferenco de ILEI en Hanabanllja en 1990 kaj Matanzas en 2010.

2022: Ne venis reago.
2021:  iris feb 17. Samtage respondis MG.
2017: Iris al KEA, Amer Kom kaj MS dec 2017

# Meksiko 

**Landkodo:** MX**, Mono:** MXN (peso). **Telefonkodo:** 52**. Ĉefurbo:** Meksikurbo. Kat. 3.

**Areo:** 1.9 m. km² (14a en la mondo). **Loĝantaro:** 126 m, (10a) el kiuj 9 m ĉefurbe, 21 milionoj en la ĉefurba regiono.
**Denseco:** 66 / km². **Jara kresko:** 1.06%  **Meza aĝo:** 29-jara  **Urbiĝo:** 84%

**Pokapa MEP (PAP):** $ 22, 216, 93a en la mondo. 2022.
**Vikipedio:** Havas paĝon en la E-vikipedio, sed la MEP kaj popolaj datumoj datas el 2006. Lasta redakto: apr 2022.

**Landa Asocio:** MEF. (1903. Aliĝo al UEA: 1978). **Prez.:** Mallely Martinez Mateos (adreso sube). **Membroj de UEA fine de 2021:** AM 33 + IM 101, sume 134. (signifa kresko)
**LA-adreso:** Morayma Martinez M. , Av.523, No.187,1ª Sección de San, Juan de Aragón, Del. G.A. Madero, MX-07969 Ciudad de México.
**LA retadreso:** [informacion@esperanto-mexico.org](mailto:informacion@esperanto-mexico.org) kaj estraro<ĉe>esperanto-mexico.org
**LA-hejmpaĝo:** [www.esperanto-mexico.org](http://www.esperanto-mexico.org), du-lingva.
**Telefono:** (596) 924 5144. **Membrogrupo:** *Estas.*
**Organo iama:** Ni ĉiu, red. p/a MEF. Finiĝis en 2018.

**Membraro en UEA (IM).** 2021: 101. 2010: 36.
FC: 2021: 18. 2010: 2.



**Komitato de UEA:** La prezidantino (Kom. A).
**Kotizperanto:** Martinez Mateos (MEF)
**Sidejo:** Ĉe M.M.M. Mateos. Ne estas oficejo.
**Lokaj grupoj**: Guadalajara (Jalisco), Monterrey (Nuevo León), Oaxaca (Oaxaca), Puebla (Puebla), Querétaro (Querétaro), Tecámac (Estado de México – 40 km de la ĉefurbo). Vidu la mapon.

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 2 en 2 urboj: Cetumai, Meksikurbo (México).
**Aliaj asocioj:**
TEJO (MEJ), https://www.facebook.com/MeksikaEoJunularo/
ILEI (sekcio): Carlos H. Loarca, <ilei<ĉe>esperanto-mexico.org>
Aliaj nekonataj.
**Internaciaj aranĝoj:** La Internacia Junulara Kongreso en Oaxtepec, Moelos, en 1981. La Nord-Amerika Kongreso en 1990 en Meksikurbo, por multaj survoje al la UK en Kubo. La 5a TAKE (Tutamerika Kongreso) en 2001 Meksikurbo.

2022: Ne venis reago.
2021: Sendis feb 17. Respondis MEF.
2019: Iris al MEF, AMEKOM, MS dec 20; 2017: Referencis kontrau presita JL2017

# Nikaragvo 

**Landkodo:** NI**, Mono:** NIO (cordoba)**. Telefonkodo:** 505**. Ĉefurbo:** Managvo (Managua). Kat 1

**Areo:** 130 mil $km^2$ (96a en la mondo). **Loĝantaro:** 6,6 m, el kiuj 1,04 en la ĉefurbo.
**Denseco:** 55 / $km^2$. **Jara kresko:** 1.21% **Meza aĝo:** 26-jara **Urbiĝo:** 57%

**Pokapa MEP (PAP):** $ 7,071 (159a en la mondo). 2022.
**Vikipedio:** Ekzistas ampleksa paĝo en Vikipedioj. Lasta redakto de MEP: 2007. Lasta redakto: aug. 2021.

**Landa Asocio:** Ekzistas, sed ne aliĝinta al UEA. Adreso: de Uriel Gurdián.
**LA-adreso:** Rpto Shick, 2da etapa. Igl advent., 1cO, 1cN, G-32, Managua, Nikaragvo ĉe Uriel Gurdián.
**LA retadreso:** info<ĉe>esperanto-nicaragua.org (ne funkciis feb 17, 2021, nek en majo 2022)
**Alternative:** https://www.facebook.com/esperantonicaragua/
**LA-hejmpaĝo:** www.esperanto-nicaragua.org.
**Membrogrupo:** Ne aperas.
**Membraro en UEA (IM).** 2021: 5. 2010: 2. FC 2021: 4. 2007: 1.

**Komitato de UEA:** devus aliĝi.
**Ĉefdelegito, Kotziperanto:** Ne estas.
**Sidejo:** Supozeble ne estas.

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 2 (1D, 1 VD) en 1 urbo: Managvo.
**Aliaj Asocioj:** ILEI (Kontaktpersono: Uriel Guardian, <esperantonica<ĉe>gmail.com>

2022: Ne venis reago.
2021: Transsaltita.
Iris al Uriel, AmerKom, MS dec 2017. Sen reago.

# Peruo 

**Landkodo:** PE**. Mono:** PEN (sol). **Telefonkodo:** 51**. Ĉefurbo:** Limao (Lima). Kat. 2.

**Areo:** 128,500 $km^2$ (19a en la mondo), **Loĝantaro:** 33 m, (43a), el kiuj 9.7 m. en la ĉefurbo.
**Denseco:** 26 per $km^2$. **Jara kresko:** 1.42% **Meza aĝo:** 31-jara. **Urbiĝo:** 79%

**Pokapa MEP (PAP)**: $ 15,035  (la 123a loko en la mondo). 2022
**Vikipedio:** Estas kaj ĝidatas. **https://eo.wikipedia.org/wiki/Peruo**

**Landa Asocio:** PEA, (Fond. 1975, aliĝo al UEA 1978). Membraro de UEA fine de 2021: AM 35 + IM 7, sume 42.  (kresko de  10)
**LA-adreso:** ĉe Calle Torres Paz.
**LA retadreso:** esperantolima3<ĉe>yahoo.com.
**LA-hejmpaĝo:** www.esperanto-peru.org.
**Membrogrupo:** Ne aperas.

**Membraro en UEA.** 2021: 7. 2010: 7.  FC 2021: 1. 2010: 7.   11 membroj junaj, plejparte malaperis.
**Komitato de UEA:** Rajtus je observanto. **Ne nomumita aŭ notita. Nepre ekde aŭgusto 2022!**
**Ĉefdelegito:** Ne estas, nur 6 delegitoj. **Kotizperanto:** Ne estas.
**Sidejo:** Adreso en Lima, kredeble ĉe nemembro. Supozeble ne estas oficejo.

**Delegitoj laŭ JL 2018**: 6 en 4 urboj (Arequipa, Cajamarca, Callao, Lima).
**Aliaj asocioj: --**

2022: Ne venis reago.
2021: Sendis feb 17. Sen reago.
2019: Iris al PEA, AMEKOM, MS

# Urugvajo 

**Landkodo:** UY**, Mono:** UYU (peso). **Telefonkodo:** 598**. Ĉefurbo:** Montevideo. Kat. 4.

**Areo:** 176,200 km² (89a en la mondo), **Loĝantaro:** 3.5 m, (134a) el kiuj 1.3 m en la ĉefurbo.
**Denseco:** 18.6 per km².  **Jara kresko:** 0.35%  **Meza aĝo:** 36-jara  **Urbiĝo:** 96%
**Pokapa MEP (PAP):** $26, 663 (83a en la mondo). 2022



La publiko en la inaŭguro de la Konferenco de ILEI en Montevideo en 2014.

**Vikipedio:** Havas paĝon en la Eo-vikipedio, sed MEP el 2006. Lasta redakto: nov 2021.

**Landa Asocio:** UES, (Fond. 1924, aliĝo al UEA 1993). Prez.: Alberto Barrocas. Membraro de UEA fine de 2021: AM 17 +IM 8 (estis: 14), sume 25. Pli frue: 48.
**LA-adreso:** Colorado 2323, UY-11800 Montevideo (ĉe la prezidanto).
**LA retadreso:** ues@esperanto.org.uy. (paneis)
**LA-hejmpaĝo:** http://www.esperanto.org.uy/

**Membraro en UEA (IM).** 2021: 8. **2018: 15.** 2010: 9.  FC 2021: 0. 2010: 1.
**Kotizperanto:** A. Barrocas.
**Observanto ĉe UEA**: Rajtus. Ne nomumita aŭ notita. Deklarias, ke volas nomumi iun.

Foto: Sekvapaĝe: La tiama urbestrino de Montevideo alparolas la konferencon de ILEI en la konstruaĵo kie Lapenna sukcesis en 1954,



**Sidejo:** Adreso en Montevideo ĉe Barrocas. Supozeble ne estas oficejo.
**Delegitoj laŭ JL 2018:** 5 (1 ĈD, 1 D, 5 FD) en unu urbo.
**Aliaj Asocioj:** ILEI (reprezentanto): Sonia Risso <sonry<ĉe>adinet.com.uy>
**Internaciaj aranĝoj:** La 48a Konferenco de ILEI en 2014 en Montevideo (vidu la fotojn).

2022: Ne venis reago.
2021: Sendita feb 17. Sen reago.
2017: Iris al UES, AMEKOM, MS dec, UES paneis.

# Venezuelo 

**Landkodo:** VE**. Mono:** VEF (bolivar fuerte) . **Telefonkodo:** 58**. Ĉefurbo:** Karakaso (Caracas). Kat. 3 (nun certe devus esti 2)

**Areo:** 916,000 $km^2$ (32a en la mondo), **Loĝantaro:** 28 m, (44a); 2.9 m en la ĉefurbo.
**Denseco:** 34 per $km^2$. **Jara ŝanĝo:** minus 0.28% **Meza aĝo:** 32-jara. **Urbiĝo:** Ne akirebla.
**Pokapa MEP (PAP):** ciferoj ne akireblaj.
**Vikipedio:** Havas paĝon kun aktualaj datumoj. https://eo.wikipedia.org/wiki/Venezuelo

**Landa Asocio:** VEA, (Fond. 1912, aliĝo al UEA 1978). **Prez.:** Ricardo Coutinho Rodrigues (nun loĝas en Argentino). **Membraro de** UEA fine de 2021: AM 25 + IM 11, sume 36.
**LA-adreso:** Apartado 47675, VE-1041 A Caracas.
**LA retadreso:** venesparanto<ĉe>gmail.com
**LA-hejmpaĝo:** www.esperantovenezuela.weebly.com (plus Facebook, Twitter kaj Instagram)
**Loka grupo:** Unu, en Karakaso.

**Membraro en UEA.** 2021: 11. 2010: 5. FC 2021: 2. 2010: 4. Ok el la dek membroj junaj.
**Kotizperanto:** Ne estas.
**Sidejo:** Adreso en Caracas. Supozeble ne estas oficejo.
**Komitato:** Rajtus je observanto, **Ne nomumita aŭ notita.**

**Delegitoj laŭ JL 2018:** 4 (1 D, 4 FD) ĉe 2 urboj (Caracas, Maracaibo)

**Aliaj asocioj:** ILEI (kontaktpersono). p/a VEA.

2022: Ne venis reago.
2021: Sendis feb 17 al VEA kaj RCR. Sen reago
2019: Iris al VEA, AMERKOM kaj MS dec 20

---

## Konsisto de la Amerika Komisiono (mandato ĝis aŭgusto 2022)

Maritza Gutierrez, Kubo, gvidanto
Fernando Maia, Brazilo, rilatoj kun UEA
Guy Matte, Kanado. juraj konsiloj kaj rilatoj kun nordamerikaj esperantistoj
Luis Obando, Kolombio/Nederlando, rilatoj kun sudamerikanoj
Querino Neto, Bazilo, rilatoj kun TEJO tra la kontinento
Rafael Mendoza, Ekvadoro, rilatoj kun ekvadoraj kaj peruaj esperantistoj
Ricardo Coutinho Rodriguez, Venezuelo/Argentino
Stefan MacGill, kunordigo kun aliaj kontinentaj komisionoj.

Raportoj pri Norda Ameriko aperas en la nova regiono 'Pacifiko', kio neniel malhelpas kunlaboron inter Usono, Kanado, Meksiko kaj la landoj de Latin-Ameriko. La Amerika Komisiono de UEA respondecas pri la tuta Ameriko. Laborplano de la Amerika komisiono bonvena.

## La Komitato de UEA

Latin-Ameriko ne ĝuas multan aperigadon el inter la komitatanoj por UEA. Ĝi havas entute nur ses komitatanojn (5 A, 1 B kaj 0 C) el kvin landoj (Argentino, Brazilo, Kolombio, Kubo kaj Meksiko). Sed ĝi samtempe havas kvin landojn, kiuj rajtus havi observanton, kune kun la rajto esti pli komplete informita) sed ial ne nomumis iun.

Ĉu tio okazis, ĉar la landoj ne respondis aŭ ili ne scias, kion ili devas fari? La kvin landoj estas Ĉilio, Kostariko, Peruo, Urugvajo kaj Venezuelo.

Jam por la Kongreso en Montrealo en aŭgusto 2022 en la komitato estos rekonsistigita. La landoj devas konfirmi aŭ nomumi siajn A komitatanojn. La B-komitatanoj estas jam deciditaj sen elekto. En Montrealo la nova komitato elektos la C-komitatanojn.

Nuntempe la komitato konsistas grandparte de blankhaŭtuloj, kiuj reprezentas la riĉajn landojn. Mankas multaj alikoloraj homoj el la neriĉaj landoj, ĉar UEA ne sufiĉe invitas ilin partopreni, kaj ne laboras sufiĉe por klarigi la eniran meĥanismon. Komentario SMG

# FAKA KAVALKADO

**Ĉi tie ni prezentas la ses fakajn asociojn aliĝintajn al UEA: (Instru-istojn, Fervojistojn, Komercistojn, Blindulojn, Medicinistojn kaj Sciencistojn) kiel ili figuras en la koncerna kontinento kaj kiel kontakti ilin kaj vidi iliajn retejojn, kune kun pritakso de ilia aktualeco.**

## Instruistoj (ILEI): 2 sekcioj, 8 pliaj: 10 entute

**Argentino:** kontaktpersono: G.E. Wagner, <info<ĉe>esperantoklubo.org>
**Bolivio:** kontaktpersono: Leandra Dia Rios <mileis_7<ĉe>hotmail.com>
**Brazilo**: sekcio: A.A. Alves Filho, < esperantomaceio<ĉe>yahoo.fr>
**Ĉilio:** reprezentanto: Campo Grez, <strigo<ĉe>speranto.cl>
**Kostariko:** kontaktpersono: s-ro Hugo Mora <tikoguau<ĉe>gmail.com>
**Kubo:** sekcio: Magaly Molina, <maga1958<ĉe>nauta.cu>
**Meksiko:** sekcio: Carlos H. Loarca, <ilei<ĉe>esperanto-mexico.org>
**Nikaragvo:** kontaktpersono: Uriel Guardian, <esperantonica<ĉe>gmail.com>
**Urugvajo:** reprezentanto: Sonia Risso <sonry<ĉe>adinet.com.uy>

## Komercistoj (IKEF):

**Brazilo:** filio: Fabricio Valle, <esperanto@fabriciovalle.com.br>

## Medicinistoj (UMEA)

Pretendas havi kontakton en Brazilo, sed maleblas trovi informojn pri tio.

## Fervojistoj (IFEF): neniu agado konstatebla

## Blinduloj (LIBE): neniu agado konstatebla.

==================

## Faka Kavalkado – grava nova servo de UEA por elstarigi niajn aliĝintajn fakajn asociojn.

## Fontoj por 2022

### Popolaj datumoj

https://www.worldometers.info/world-population/population-by-country/
Prilaboro de datumoj de Uniĝintaj Nacioj, (Department of Economic and Social Affairs, Population Division. World Population Prospects: The 2019 Revision. Proklamas sin 2022, sed fakte la ciferoj restas senŝanĝaj depost 2019.

Ĉefurbaj popoloj, laŭ unuopaj esploroj. Kiam eble, temas nur pri la vera ĉefurba zono, foje temas pri la pli granda metropola areo.

### Publika bonfarto

https://en.wikipedia.org/wiki/List_of_countries_by_GDP_(PPP)_per_capita. Persona aĉetpovo (PAP). Datumoj ĝis apr 2021 laŭ ciferoj de la Internacia Monuma Fonduso (IMF) en USD.

Iris al AMER-KOM majo 5, LATINAM grupo majo 12, sendita por afiŝiĝo majo 31.

**LAPA – grava servo de UEA – posteulo por la parto de la iama Jarlibro, kiu prezentis la landajn asociojn**